LONDON-MÄRKET

finns nu att köpa. Använd brevmärket för världskongressen i London 1971. Gör en värdefull reklam. Sätt det på all post.

1 karta — kr. 1: 25

3 kartor — kr. 2: 75

Insätt likviden på postgirokonto 14 74 29-5 (Sv. Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).

Reseledare

Ges-øj Bodil o. Gustav Kühlmann, Köpenhamn, kända och välkända sedan många år tillbaka.

Reseledarna kommer givetvis att till alla anmälda utsända fullständigt, detaljerat program.

Pris för gruppresan

Omfattar flygresorna Köpenhamn—Dublin, Dublin—London, London—Köpenhamn, transporter till och från flygplatser, hotell med halvpension på Irland, hotell med frukost i London, bussutfärder på Irland, flygplatskostnader,

s. kr. 1.655: —

Anmälan

I. Till själva kongressen. Se anvisningar å sista sidan.

II. Till gruppresan.

a) Anmälningsavgift å kr. 100: — insättes på postgirokonto 14 74-29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö). Anteckna på talongen vad som avses. Denna avgift skall avdragas vid slutlikvid.

b) Anmälningsstalong insändes. Om man ej fått sådan i samband med anmälan till kongressen, kan den erhållas hos s-ino Ester Andrén, Ryttmästaregatan 12, 217 52 Malmö.

Anmälan senast den 1 juni, helst tidigare.

RECENZOJ

HEINE, KALOCSAY,
WARINGHIEN

Kantoj kaj Romancoj de Heinrich Heine. Bindita 381 paĝoj. Eldonejo Stafeto. Havebla ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö. Prezo sv. kr. 42: 35.

Jen bela konstelacio kies komuna brilo elradias el nova eldono de STAFETO: "Kantoj kaj Romancoj".

La libroeldonado de nia relative malgranda popolo estas preskaŭ mirindaĵo. Se ĝi eĉ ne kompare okupas kvante honorindan lokon statistikan, ĝia kvalita nivelo certe superas tiun de kiu ajn alia lingvo.

Ĉi koncerna verko estas bonvena. Ĝi plenigas oscedan interspacon en la indekso de nia raduka literaturo. Krome ĝi provizas al ni novan pruvon pri la freŝa vivo de nia lingvo. La ĉefparton tradukis Kalocsay, dum Waringhien signis kelkdekon el la poemoj. Ni vere ŝuldas dankon al la tradukintoj kaj la eldonisto pro tiu libro.

La vasta elekto el la ampleksa verkaro de Heine spegulas al ni lian tutan vivon. El la sekaj preslitteroj li aperas al ni kiel tute viva; ofte resonas lia propra voĉo, liaj animo kaj koro sentigas sian ĉeeston.

La plej alta esprimo de arto manifestiĝas en la simpleco. La poezio de Heine havas klaran simplecon. Traduki grandan kvanton de tia poezio neniel estas facila ludo. La simplecon de formo kaj esprimo oni atingas nur pene; ĝenerale ĝi postulas laboron kvazaŭ ŝtonhakistano. Aldonu al tio la poetsufokan malriĉon de sinonimoj en esperanto, kaj tuj aperos la dimensio de l'malfacila tasko. Aperas eĉ diversspecaj neblaĵoj, jen ekz.:

(orig.) Wir weben, wir weben!

(trad.) Ni teksas, ni teksas!

Kia diferenco! Senrimeda la tradukanto devas en tia kazo kontentigi per absolute nekontentiga, sen-tinta prozaĵo. En tia okazo helpas eĉ ne la talento de Kalocsay.

Kompreneble lia eminenta povo rajtigas al li komandi la servon de licentia poetica. Ofte li uzas ĝin en tiu-ĉi verko, sed bedaŭrinde ne ĉiam sukcese. Kelkloke domaĝas perfortigo de gramatiko. Areto de novimportitaj vortoj iel ne ŝajnas konveni al Heine, iel ŝajnas lingve kaj psikologie kontrasti. Eble nur ĉar ili ankoraŭ aperas fremdaj. Vicigo de forte akcentaj silaboj mortigas iam la ritmon, kaj ripetado de preskaŭ patentaj vortoj ie makulas. Ŝajnas al mi motivite jam averti kontraŭ senkritika imitado de similaj facilaĵoj.

Facile pensi: "...nu, Kalocsay sanktigis tion, do ankaŭ mi rajtas". Licentia poetica havas limojn. Evoluo de lingvo okazas parte per imitado, kaj esperanto povas poe ekliti en la senlogikan komplikecon de naciaj lingvoj.

Ĝeneralan romanon oni tralegas, ĝi estas poste "legita". Mezkvalitan pentraĵon oni preterpase rigardas en ekspozicio kaj daŭrigas al la proksima objekto — oni "vidis" ĝin — finitaj oferoj. Sed "Kantoj kaj Romancoj" ne estas samspeca; tia libro ne havas finon. Kun freŝa plezuro oni malfermas ĝin denove. Tial havigu ĝin por ke vi ne devu bedaŭri la prokraston post la elĉerpiĝo de la eldona stoko. Ĝi estas grava, valora, kaj ĝi havas perlojn. La tradukintoj ĝenerale sukcesis en sia malfacila tasko; ili provizis al siaj laboraĵoj stampon de originaleco. Malfacile ion elekti el la abundo, sed jen ekzemplo el la poemo

GEFIANCOJ LAŬ DESTINO

*Vi ploras kaj rigarde min esploras
kaj kredas, ke pro mia plag vi ploras —
ne scias vi, virino, ke vin mem
koncernas viaj larmoj, via ĝem.*

*Ho diru, ĉu tra via sentoplekto
kelkefoje ne enĉetelis sin konjekto,
kiu sekrete al vi manifestis,
ke parigitaj de l'destin ni estis?
En kumo estus al ni la feliĉo
donita, nur pereco ĉe disiĝo.*

*Skribite staris en la libro granda
ke ni du amu nin kun am kunjanda.
Sur mia brusto estus loko via,
tie vi povus iĝi memkonscia;
mi povus vin el via plantvegeto
elsavi, kise vekti, ho floreto,
levi al mi por vivo bela, inda —
al vi animon estus mi doninta.*

S. A. J.

HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO

Unua kajero 1970. Societo de Amikeco, Esperanta Sekcio, Kostiuškos 36, VILNIUS, Litova SSR, Sovetunio. 32-paĝa revuo, proks. A 4. Havebla unuope, are, abone. Pago per esperanta literaturo laŭ interkonsento. Kore-spondanoncoj.

Nova floro el la bukedo de esperantorevuoj. Tre plaĉa ekstero modernstila kun verŝajne malnova, tipa teksfigurajo kiel dekoracia fono. La kajero estas bona pruvo pri la fakto ke oni povas atingi valoran rezulton per simplaj rimedoj.

La enhavo estas varia kaj interesa kaj atestas pri grava kaj efika aktiveco en la prahejmo de la baltaj popoloj kaj kulturo.

Oni permesas represon kaj tradukon de la enhavo kondiĉe de mencio pri la deveno kaj alsendo de la koncerna presaĵo. Volonte oni akceptas diversmanieran kunlaboron kaj donas informojn.

"Horizonto" estas havinda revuo kaj la serioza agado de la litova esp.-movado meritas atenton kaj apogon.

S. A. J.

ESPERANTISTA KULTURDOMO EN GRESILLON, FRANCUJO

havos la jenajn aranĝojn dum la somero:

4—25 julio: Kulturaj Esperantistaj Semajnoj.

25 julio—7 aŭgusto: Kulturaj kaj Turismaj Ferioj.

7—14 aŭgusto: Postkongreso de SAT.
15 aŭgusto—4 septembro: Studsemajnoj.

Informoj kaj aliĝoj: Kastelo Gresillon, 49 Baugé, Francujo.

SOMERO

KAJ SUNPLENAJ TAGOJ —

—[^] guu ilin kun Tibor Sekelj
en

"TRA LANDO DE INDIANOJ"

Prezo kun imposto, broŝ. kr. 28: 25, bind. kr. 35: 30

Förlagsföreningen Esperanto

Fack, 200 42 Malmö 7.

Postgiro 578

HELSINGÖR 1971

40-jara feria kursarango

La internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingör okazos 25/7—1/8 en La Internacia Altlernejo (tute moderna). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo kaj por ĉeesti nian 40-jaran jubileon. Prospekto senpage havebla ĉe

L. FRIIS

Ingemannsvej 9

DK-8230 Åbyhøj, Danlando

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 17—23.10 1971. Programo baldaŭ havebla ĉe L. Friis.

NORVEGA VIZITO EN GOTENBURGO

S-ro John Berggreen el Norvega Esperanto-Ligo vizitis Gotenburgo en marto kune kun nia japana samideanino Tamiko Kaŭkami. Oni provis speciale kontakti la skoltojn — s-ro Berggreen estas ja skolta gvidanto kaj f-ino Kaŭkami reprezentis la landon, kie okazos la skolta ĵamboreo — kaj la vizitantoj prelegis por la skoltoj en i. a. Kungälv kaj Hisingskärna. Esperantista renkontiĝo aranĝita de la Esperantoalianco okazis sabatovespere la 6-an de marto en la ejoj de IOGT.

ESPERANTO ĈE ROTARIANOJ

Je Marta kunveno de la Rotaria klubo en Norrahammar direktoro Gerhard Nyqvist prelegis pri L. L. Zamenhof, kiun li — laŭ tradicio de la klubo — elektis "homon de la monato" (månadens man).

ÅRSMÖTE

Härmed kallas andelsägarna i

FÖRLAGSFÖRENINGEN
ESPERANTO U. P. A.

till ordinarie årsmöte
söndagen den 30 maj 1971
kl. 16.00

på Hotell Malmen, Stockholm.

Ombud för andelsägande förening skall inlämna fullmakt före årsmötets början. Ärenden enligt stadgarna, § 14.

Styrelsen

JUBILEA GOTENBURGO BONVENIGAS VIN!



En la jaro 1971 Gotenburgo festas la 350-jaran datrevenon de sia fondiĝo. La urbo kompreneble ne povas nomi sin mezepoka, sed la jaroj sufiĉas por ke ĝi estu mezaĝa. Tio signifas, ke Gotenburgo estas en sia plej bona aĝo.

Por la jubileo estas preparitaj riĉaj programoj, kiuj certe kontentigos ne nur la gotenburĝanojn sed ankaŭ la vizitantojn.

Eĉ se oni festas la jubileon dum la tuta jaro, la unua semajno de junio fariĝos aparte intensiva. Vendrede, la 1-an de junio, preskaŭ la tuta urbo estos fermita al la trafiko, kaj la publiko povos ĝui altkvalitan programon, prezentata sur tri grandaj eksteraj scenejoj — Placo de Gustavo Adolfo, Götaplatsen kaj Kungstorget. En la sekvantaj tagoj vi povos elekti inter paradoj, futbala matĉo kaj danco kaj amuzi vin ĝis malfrua nokto.

Por amikoj de sporto estas preparita ankoraŭ unu granda evento: la matĉo de atletiko inter Finnlando kaj Svedio.

La amantoj de bela arto havos eblecon vidi la operon "Aida" de Verdi la 1-an de septembro en la nova moderna halo Scandinavium. En la ĉefa rolo kantos la fama Birgit Nilsson.

Ankaŭ la branĉo de popola arto estos reprezentata en la jubilea programo. Inter la 11-a kaj 16-a de aŭgusto okazos Internacia Festivalo de Popoldancoj en Gotenburgo. Venos grupoj el 15 landoj, inter ili el Francio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio kaj Sovetunio. Ĉiu grupo par-

toprenos en du festprogramoj krom la prezentadoj en la urbo.

Gotenburgo estas konata urbo de foiroj kaj kongresoj. Dum la jubilea jaro okazos multaj diversaj foiroj — inter alie ni menciuj Svedan Foiron kun ekspoziciantoj el pli ol 30 landoj kaj Svedan Internacian Boat-ekspozicion, kie la svedaj boatkonstruistoj ekspozicios siajn verkojn en akra konkurenco kun la kolegoj en aliaj landoj.

Kaj kompreneble Liseberg la konata amuzejo, ne povas malatenti la feston. Ĝi invitas al diversaj programoj dum la tuta jubilea sezono. Restoracioj kaj noktaj kluboj estos malfermitaj multe pli longe ol kutime.

Dum tiu jubilea sezono okazos en Gotenburgo almenaŭ unu esperantista aranĝo, nome **internacia semajno** inter la 24-a kaj 30-a de julio. Aranĝas INTER, memstara agadgrupo por Esperanto. Oni loĝos en OK Motorhotelo en la nordorienta parto de la urbo. Aŭtobusa rondveturo, boata ekskurso tra la kanaloj kaj haveno, vizitoj al diversaj vidindaĵoj estos aranĝataj. Okazos krome prelegoj pri lingvaj demandoj kaj ĝenerala diskuto pri "La aktuala situacio de la Esperanto-movado". Vidu cetere apartan anoncon.

INTER aranĝas ankaŭ vojaĝon al la UK en Londono, kaj oni foriros en la lasta tago de la internacia semajno, la 30-an de julio. La vojaĝo okazos per ŝipoj kaj trajno (tra Danlando). Petu informojn de INTER laŭ aparta anonco. Oni povos kompreneble anonci sin al la vojaĝo sen partopreni la internacian semajnon.

MARSO - NAJBARA PLANEDO

De Elis Dahlgren

Ĉi tiun someron Marso estas pli ol ordinare proksima al la tero. La planedo situos la dekan de aŭgusto en "opozicio" rilate al la suno. Astronomie same kiel politike "opozicio" signifas "kontraŭstaron". Koncerne astrojn tamen laŭ origina geometria senco: Marso kaj la suno tiam havos diametre kontraŭajn poziciojn sur nia firmamento. Sekve Marso la menciitan tagon leviĝos je sunsubiro kaj subiros je sunleviĝo. Du tagojn poste la planedo estos pli proksima al ni ol dum multaj jaroj pasintaj kaj venontaj. La tiam distanco estos 56 milionoj kilometroj. Marso estos dum aŭgusto situa en la konstelacio Kaprikorno kaj lumos pli forte ol iu ajn nokte videbla ĉielkorpo krom la luno. Pro suda pozicio tamen la planedo — vidata de nordaj landoj — tiam staros malalte super la horizonto kaj tial atmosferaĵoj gasoj iom paligos ĝian lumon. En Afriko kaj Sudameriko, kie la planedo estos alta sur la ĉielo, ĝia brilo estos pli grandioza. La ruĝeca koloro de Marso rememorigas kaj sangon kaj brulon. Konjektable tiu koloro kontribuis al tio, ke la antikvaj Romanoj je tiu planedo rigardis simbolon de sia milita dio.

La diametro de Marso estas 6 760 km aŭ 0,53 el la tera. Ankaŭ la denseco aŭ specifa pezo estas pli malgranda — 0,72 el tiu de la tero. La maso (tuta pezo) estas nur dekonon el tiu de nia planedo. La meza distanco inter Marso kaj la suno estas iom pli ol unu kaj duona sundistanco tera. Pro tio la suno lumas sur Marso apenaŭ duone tiom forte kiom sur la tero. La periodo de la orbita rondiro de Marso ĉirkaŭ la suno estas 1,88 jaroj aŭ 687 tagoj teraj. Por sia rotacio Marso bezonas 24 horojn kaj 37 minutojn. Do marsa tagnokto estas iomete pli longa ol la nia. Vivante sur marso ni kalkulus 669,2 tagnoktojn po unu jaro tiea. La elipsa orbito de Marso estas pli ekcentrika ol tiu de la tero kaj la distancoj inter la du orbitoj estas malsamaj laŭ diversaj direktoj. Minimuma estas la distanco inter Marso kaj la tero, kiam la du planedoj samtempe ĉeestas en la sama direkto rilate al la suno en fino de aŭgusto. Ĉijare tiu "renkonto" okazos inom pli frue, sed la distanco tamen estos proksimume plej malgranda. Marso kaj la tero "renkontiĝas" samflanke en siaj respektivaj orbitoj unu fojon po ĉirkaŭ 26 monatoj. Tamen 15 aŭ 17 jaroj pasas inter tempoj, kiam la najbarplanedo estas proksimume plej proksima al ni.



La relativaj grandoj de Tero, Marso kaj Luno. La plej granda estas Tero, la plej malgranda Luno.

Simile al la kondiĉoj de la tero, la rotacia akso de Marso kliniĝas 25 gradojn rilate al la orbita nivelo. Tio kaŭzas sur la najbara planedo preskaŭ egalajn klimatajn zonojn kaj sinsekvadan de sezonoj, kiel ĉe ni. Sed la marsa klimato sendube estas pli malvarma kaj seka, kaj la sezonoj tie preskaŭ duoble longedaŭraj.

Neniu alia planedo estis objekto de tiom fantaziaj spekulativaj precipe pri ekzisto de vivaj estuloj kiom Marso. Kaŭzoj de tio estas i.a. relativaj proksimeco kaj esprimebleco kaj similaj kondiĉoj koncerne klimatajn zonojn kaj ŝanĝiĝadon de sezonoj kaj tagnoktoj. Ni do laŭ nuna eblo iom esploru la verajn kondiĉojn al vivo tie.

Jam antaŭ jarcentoj niaj astronomoj per siaj teleskopoj konstatis sur Marso sensanĝajn formojojn terenajn kun pli malpli kontrastaj koloroj kaj helecoj. Laŭ tiuj ili desegnis mapojn, kiuj montras pli helajn makulojn ("landojn") kaj pli malhelajn tiajn ("marojn") k. t. p. Al la terenajoj oni pruntis nomojn el la klasikantikvaj geografiaj kaj mitologiaj. Sur Marso ni ekz. retrovas la landojn Aŭsonia, Hellas kaj Libia kaj la margolfon Granda Sirta. Nun tamen estas konstatite, ke tiuj "maroj" ne havas saman naturon kiel la maroj sur la tero. Longe oni ankaŭ observadis multajn variadojn en la aspekto de la planedo. Ĉefe tiuj estas pli malpli regulecaj kaj okazas laŭ la sekvado de sezonoj. Rimarkindaj estas la du blankaj kalotoj, kiuj ĉirkaŭas la polusoj. Tia kaloto grandparte malvastiĝas ĉe la poluso, kie printempo aŭ somero regas, sed male samtempe plivastiĝas ĉe la kontraŭa poluso, kie tiam estas aŭtuno aŭ vintro. La mapdesegnintoj nomis la blan-

kon "neĝo", sed nun oni ne kredas pri tia naturo je ĝi. Pli supozeble la marsa neĝo konsistas el kristala karbondioksido. De tempo al tempo ankaŭ maldensaj nuboj aŭ nebuloj estas observitaj super la kampoj de Marso.

La jaron 1877an itala astronomo G. V. Schiaparelli komunikis, ke li estas ektrovinta multajn rektajn kaj malhelajn liniojn sur la surfaco de Marso. Tiujn liniojn, kiuj laŭvide trakrucigis diversadirekten la landojn de "maro" al "maro", li iom nepripensite nomis "kanaloj". Nekritikemuloj tuj komprenis tion tiel, ke li estas konstatinta artefarite fositajn akvovojojn sur la najbara planedo. Tiam estis la konvena tempo por la superinteligentaj marsanoj eniri la scenon! Kiuj aliaj estus kapablaj konstrui tioman kanalsistemon? Tamen oni laŭ modernaj esploroj "bedaŭrinde" konstatis, ke la famaj "kanaloj" ne ekzistas reale, sed nur estis optikaj iluzioj kulpe de neperfektaj instrumentoj kaj nekla-reco de la tera atmosfero. Detalaj fotografaĵoj transsenditaj de usonaj marseksploriloj konvinke montras, ke la marsa surfaco surprize multe pli similas al tiu de la luno ol tiu de la tero. Ankaŭ Marso estas grandparte preskaŭ kovrita per krateroj grandaj kaj malgrandaj. Plej supozeble tiuj estas cikatroj de alfalintaj meteoroj. Sed de "kanaloj" neniu spuro estas videbla. La marsa tereno tamen estas iom alia ol la luna. Certaj krateroj, konsiderataj pli "malnovaj", evidente estas pli malpli nivelitaj de erozio pro iomaj atmosferaĵoj fortoj. Sur la luno neniu erozio estas spurebla.

Tage temperaturoj en marsaj regionoj intertropikaj supozeble atingas kelkajn gradojn 0° C. La noktoj tamen sendube estas malvarmegaj. Vintraj temperaturoj en regionoj ĉirkaŭpolusaj kredeble estas proksimume — 100° C. eĉ tage. La denseco de la atmosfero estas taksita je unu centono el tiu de la nia. Ĉefe ĝi konsistas el karbondioksido. La peza forto aŭ gravito ĉe la marsa surfaco estas nur 0,376 el tiu ĉe la tersurfaco kaj la atmosfera premo tie mezurita je 5 ĝis 9 milibaroj. El tio ni povas konkludi: Laŭ nia nuna kono la marsa klimato estas treege negastigema. Kiom ni kapablas juĝi la kondiĉojn por vivaj estaĵoj sur Marso estas tre malfavoraj. Ŝajne nur primitivegaj, senpretendaj kaj eltenpovaj vivaĵoj eble ekzistas. Homo el la tero absolute ne povus tie vivi sen spaca ŝirmovesto. La teknikaj progresoj pli kaj pli akcelas kaj estonte kiam terhomoj kun diversaj instrumentoj estos transportitaj sur la surfaceton de Marso, ni havos pli precizan scion pri la kondiĉoj tie. La malfacilaĵoj vojaĝi tien tamen estas multe pli gravaj ol koncerne la lunon. Eĉ je minimuma distanco Marso estas 145-

oble pli malproksima ol la luno! Kiam homoj el la tero iam vizitos Marson, ili ŝajne ne atendu kunfrontigon kun superinteligentuloj!

Ĉirkaŭ Marso rondiras du satelitoj tamen multe pli malgrandaj ol nia luno. Iliaj nomoj Phobos kaj Deimos signifas "Timegon" kaj "Teruron". Vere konvenaj nomoj al akompanantoj de la dio de milito! Phobos havas diametron de 17 km kaj ĉirkaŭiras Marson en 7,65 horoj. La diametro de Deimos estas nur 8 km kaj ĝia rondira periodo 30,30 horoj.

Vidataj de Marso nia tero kun la luno aperas kiel duobla forte lumanta "stelo" matena aŭ vespera.

Elis Dahlgren



Dürer kaj lia epoko

Gyula. Okaze de la 9a Somera Esperanto-Universitato en Gyula, Hungario, de la 4—10 julio 1971, D-ro Werner Bormann, Hamburg, prezidanto de GEA, prelegos pri la temo "Dürer kaj lia epoko". Detalojn pri SEU petu de Somera Esperanto-Universitato, Petöfi tér 3, Gyula, Hung.

NI FUNEBRAS

Mortis nia membro **Helge Sjöberg**, Gnosjö, la 2 marto 1971. Li testamentis al SEF valorajn librojn el sia esperantobiblioteko.

Mortis nia membro **Gustav Esberger**, Sundsvall. Amikoj kaj la esperantoklubo Amika Rondo je lia honoro donacis 200 kronojn al SEF.

La plej maljuna esperantisto de Svedujo, **Otto Rösler**, Borås, mortis, 101-jara. Dum pli fruaj jaroj li gvidis la movadon en Borås, kaj li restis fidela membro ĝis la fino.

BONVENON AL GOTENBURGO KAJ ... AL LONDONO

La urbo Gotenburgo, mondkonata havenurbo ĉe la sveda Okcidenta Marbordo, tutan 1971 festas sian 350-jaran jubileon. En la kadro de la urba jubileo ni invitas vin al sestaga restado en amika, internacia Esperanto-rondo 24—30 julio. Atendas vin interesa, varia kaj altkvalita programo.

Gustateme okazos komuna ŝipveturo al la 56:a UEA-kongreso en Londono, favorpreze aranĝota por niaj gastoj kaj aliaj esperantistoj.

INTER

Agadgrupo por Esperanto

Box 55028
S-400 53 Gotenburgo
Svedio
Telefona (031) 48 95 97

P. S.

Mendu ankaŭ novan turistan prospekton pri Gotenburgo en Esperanto, nepre skribante rekte al: Turista Oficejo, Parkgatan 2, S-411 38 Gotenburgo, Svedio.

"KULTURAJ KAJEROJ"

alportas interesajn legajojn, diverstemaj, diversdevenaj, kaj novaĵojn pri la Kulturdomo.

Esperantista Kulturdomo

Gresillon — 49 — BAUGE
Francujo

PACPREMIO AL ANDREO CSEH



Laŭ propono de la Sveda Esperanto-Federacio, la Stokholma Pac-Asocio aljuĝis sian lingvan premion por la jaro 1970 al Andreo Cseh, direktoro de Internacia Esp. Instituto kaj sekretario de Universala Ligo, "pro unika vivfaro per diskonigo de l'Internacia Lingvo Esperanto" tra multnombraj eŭropaj landoj, i. a. Cseh-metodaj kursoj en la Sveda parlamento kaj gvidado de ŝtataj seminarioj por la sveda instruistaro.

La premiaj rentoj devenas de la fondaĵo de Josefina Larsson, iama hejmmastrino ĉe unu de la kunlaborantoj de Alfred Nobel, kun la intenco "premi meritan pioniron de internacia lingvo, kiu havas ŝancon deveni lerneja instruobjekto."

Ĉi honorigan premion oni disdonas nur ĉiun trian jaron al altmeritaj pioniroj de l'Internacia lingvo.

T. M.

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet



31 juli—7 augusti 1971
LONDON, ENGLAND

blir platsen för Esperantovärldskongressen 1971. Givetvis skall Ni vara med. Anmäl Eder därför **redan nu till kongressen**. Svensk förmedlare (Peranto) av kongressanmälningar är som vanligt endast Svenska Esperanto-Förbundet.

Anmälningssblanketter erhålles efter rekvisition hos s-ino Ester Andrén, Ryttmästaregat. 12, 217 52 Malmö (tel. 040/652 09).

Anmälan. Anmälningssblanketter och sedermera även beställningar av logi och utfärder skall insändas till samma adress, s-ino Andrén, Malmö, och icke till Holland eller England.

Likvid. Avgifterna insättes på postgirokonto 14 74 29-5, Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö.

KONGRESSAVGIFTER

(Obs! Svenska kronor)

	<i>Till</i>
	<i>20/6</i>
	<i>1971</i>
1. Kongresano, ne membro individua de UEA	148:—
2. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun Jarlibro (MJ)	127:—
3. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA)	105:—
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1	104:—
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 2 aŭ 3	89:—
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara	45:—
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara	75:—
8. Blindul(in)o	60:—

Var vänlig skriv namn etc. tydligt på anmälningssblanketten men ej några avgifter (det gör SEF). Meddela i stället allting tydligt på postgirotalongen.

Rabatt får som synes direkta medlemmar i UEA. Det lönar sig alltså att bli direkt medlem. Ni vinner många fördelar. Gör allvar av att anmäla Er som direkt medlem av UEA.

Gåvor: Som vanligt mottager SEF och vidarebefordrar gåvor till **Litteraturfonden** (tävlingspremier), **Blindfonden** (de blindas kongress), **Adopta Kaso** (för dem som ej kan betala från eget land), och **Adoptaj Gepatroj** (helst min. sv. kr. 45:— för barnkongressen — eller det belopp, som Ni kan skänka). Givares namn publiceras. Det är ovanligt få svenskar som observerat dessa fonder. **SEF**

La Espero

Svenska Esperanto-Tidningen

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Krokvägen 85, 122 32 Enske.

Ĉefredaktoro: Åke Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping. Tel. 0510/235 26 (laborejo 0510/221 30).

Literatura redaktoro: Tiberio Morariu.

Teknika redaktoro: Sune W. Ahlm.

Prezo de jarabono: 15 sv. kr. (postĉeka konto 20 12).

Prezo de anoncoj: 1/1 paĝo 180:—, 1/2 = 90:—,

1/3 = 60:—, 1/6 = 30:—, 1/12 = 15:—.

Milimetra prezo 40 öre.

Korespondanconco: 25-vorta = 4:—, 50-vorta = 8:—.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO



Adreso: Jungfrugatan 30, 3 tr.
114 44 Stockholm

Girkonto: 20 12

Telefona: 08/62 58 76

Dejortempo: Merkrede 18—20a horo

Kotizoj por Rektaj membroj: 15 kr., junuloj 7 kr.
familia membro sen gazeto 5 kr.

ESTRARO

Prezidanto: Jan Strönne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.
Tel. 040/12 92 11.

Vicprezidanto: Ragnar Hjorth, Kronobergsgatan 25, 4 tr ö. g.,
112 33 Stockholm. Tel. 08/52 76 67.

Sekretario: Sven Alexandersson, Krokvägen 85,
122 32 Enske. Tel. 08/49 80 24.

Vicsekretarioj: Bertil Akerberg, Lillsvängen 39,
126 57 Hägersten. Tel. 08/46 29 95.

Artur Malmkvist, Asögatan 182, 116 32 Stockholm.
Tel. 08/41 78 74.

Franke Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Kasistino: Maria Wästfelt, Cedergrensvägen 27,
126 36 Hägersten. Tel. 08/45 02 41.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42, Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B



Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkrede 10.00—11.00 ĵaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578.



Administranto: Anna-Greta Strönne

Prezidanto: Sven Sjöblom, tel. hejma: 040/11 25 78